

# BONA ESPERO

REVUO DE  
SUDAFRIKA ESPERANTO-ASOCIO

VOLUMO: 1985  
NUMERO: 2

ISSN 0006-7024



## BONA ESPERO

Revuo de la Sudaŝrika Esperanto-Asocio [SEA]

Redaktoro: S-ro Cobus Zeelie  
Subredaktorino: S-ino Adèle Fouché

Redakcia Adreso: Posbus 12271, Centrahil, Port Elizabeth, 6006 Suid-  
Afrika / South Africa / Sudaŝriko

Kunlaborantoj: S-ro S de Waal ..... Natalo  
S-ro F M Woolf ..... Okcidenta Kablando  
S-ro S-ino A K Fouché .... Orienta Kablando  
S-ro J de Klerk ..... Okcidenta Transvalo  
S-ro H W Appel ..... Orienta Transvalo  
Vakantaĵo ..... Oranĝa Liberŝtato  
S-ro Z Boglari ..... Svaŝilando  
S-ro J Hammes ..... Universitatoj

Kontribuaĵoj: Oni sendu al la Redaktoro aŭ Kunlaboranto en sia  
landparto. Kontribuaĵoj plivole estu maŝinskribi-  
taj. Manuskriptoj nepublikigitaj neresendiĝos.  
Nek la Redakcio nek SEA respondecas pri la enhavo  
de anoncoj kaj promesoj faritaj en ili.

Prezo: Membroj de SEA ricevas la revuon senpage. Nememb-  
roj abonu pere de la SEA Kasisto, P O Box 1227,  
Cape Town, 8000 South Africa / Sudaŝriko

Estraro de SEA: Prezidanto - S-ro E de Kock  
Vicprezidanto - S-ro A von Blottnitz  
Sekretario - S-ro O Sher  
Kasisto - S-ro C S Beckford  
Komitatanoj - S-ro H W Appel  
S-ino A K Fouché  
S-ro J Hammes  
D-ro J van D Strydom  
S-ro F M Woolf  
S-ro J J Zeelie

Adreso de SEA: La Sekretario, Sudaŝrika Esperanto-Asocio,  
Bronkhorststraat 75, Groenkloof, Pretoria,  
0181 Suid-Afrika / South Africa / Sudaŝriko

ENHAVOPaĝoĈEFARTIKOLO

Stabilo kaj evoluo en Esperanto [Edwin de Kock] 1

ARTIKOLOJ KAJ RAKONTOJ

Laborplano de UEA 3  
Protokolo de speciala kunveno de SEA pri la cent-  
jara jubileo de Esperanto [Oscar Sher] 5  
Monda loĝantaro 9  
Moderna alegorio [Colin Beckford] 10  
Kio pleje vendiĝis dum 1984 12  
Dokumenta televida filmo 13  
Kontribuas hungara samideano [Dávid Rózsa] 16  
Edzina fiasko 16  
Raporto de PEK por la jaro 1984 [Adéle Fouché] 18  
Dank-letero al ĉiuj komitatanoj kaj kunlaborantoj 20  
Helpopeto 23  
La okuloj parolas..... 23  
Japano vizitas PEK [Adéle Fouché] 25

RUBRIKOJ

El la scienco [*Kometo de Halley* - Johan de Klerk] 13  
La mondo 15  
El nia poezio [*Nostalgio* - Edwin de Kock] 17  
Venteraĵoj [Ernest Venter] 18  
Pensetoj el l'vivo 21  
Ridetu 22  
Recenzo [*Diskriminacio*] 24  
L'inkpoto 30

ANONCOJ

27

## ĈEFARTIKOLO

### STABILO KAJ EVOLUO EN ESPERANTO

*Antaŭ iam da tempo mi ricevis de nova samideano leteron en kiu li plendetis pri la tro magra vortprovizo Esperanta. Responde mi klarigis kaj konsilis jene:*

*Inter la Esperantistaro ekzistas ĝenerala konsento pri la absoluta neceso garantii la unuecon de la lingvo. Alie ĝi baldaŭ disfalus en dialektojn kaj pereus. Jam Zamenhof okupiĝis pri ĉi tiu problemo. Oni do oficialigis liajn unuajn kernoverkojn: la gramatikon, la komencan vortostokon kaj ekzercaron, kiuj ekde tiam konatiĝis kiel la Fundamento. Krome oni akceptis la principon de netuŝebleco.*

*Ĝi tiu lasta vorto signifas, ke Esperantistoj sin devontigas ne ŝanĝi la bazon de la lingvo - ĝis iam la mondo ĝin adoptos oficiale. En tiu tempo, se la praktiko tion montris necesa, la ĝusta instanco rajtos enkonduki modifojn, eĉ al la gramatiko.*

*Pri la lasta punkto, tamen oni povas nun konstati, ke tio verŝajne ne okazos. Esperanton la mondo ne alprenis rapide, kion la unua generacio - kun la escepto de Zamenhof - atendis. Ĝi disvastiĝis malrapide, ĉar ĝi suferas ankaŭ rebatojn, iafoje de perfortuloj kiel Hitler kaj Stalin.*

*La homoj ne vekigis iun bonan matenon por trovi, ke ĉie sur la planedo la nacioj aprobis kaj energie oficialigos la Internacian Lingvon. Ne, ĝi laŭgrade kreskos al rekono. Tiel ofte estas rilate al novaj ideoj grandiozaj. La metra sistemo, ekzemple, bezonis tri jarcentojn - ekde la unua teoriulo pri tia bela revo ĝis ĝia preskaŭa tutmondiĝo en nia tempo.*

*Do, verŝajne la futuran formon de Esperanto determinos - kiel la nunan - la movadoj mem, sub la malpeza kontrolo de la Akademio.*

*Ĉu tio do signifas, ke la lingvo dume restas sensanĝa kaj ne evoluas? Tute ne. La genienco de Zamenhof montriĝis ĝuste en tio, ke dekomence li rekonis gravan veron: unu homo simple ne povas elfari lingvon. Por tio necesas komunumo. Sekve li kreis nur la ĝeneralan skeleton gramatikan kaj intence enkondukis malgrandan vortprovizon. Por la kompletigo kaj plibonigo li fidis al la uzantoj, kaj precipe al la bonaj aŭtoroj.*

*Sed en tio necesas klara konscio pri du principoj ekstreme gravaj.*

*Unue, ne okazu abruptaj, grandaj ŝanĝoj. Estu laŭgradece. Zamenhof avertis kontraŭ tro multe, tro krude alportita, je unu sama tempo.*

*Due, la ĝusta maniero estas, ke oni ne altrudu tion per dekretoj de tiu aŭ alia komitato aŭ instanco, eĉ de la Akademio mem. Anstataŭe la individua uzanto de la lingvo devus eklanĉi la novan radikon - aŭ formon - ne teorie sed en sia praktiko, kun la espero, ke li trovos imitantojn. Se jes, la lingvo iomete adaptiĝas, sen subita interrompo de ĝia tradicio, kio estus minacanta ĝian unuecon. Ĉi tion oni ankaŭ nomis la vojo de neologismoj kaj arkaismoj. Tiel daŭre, kvankam malrapide, forfalas kaj aldoniĝas elementoj - proksimume kiel en la nacilingvoj.*

*Do Esperanton evoluigas ĝiaj adeptoj, kaj precipe la aŭtoroj. Pro ĉi tio oni trovas, ke la poezio estas multe malpli konservativa ol la prozo, precipe la ĉiutaga. Ĝi kvazaŭ konsistigas la avangardon aŭ - por ŝanĝi la metaforon - la laboratorion de la lingvo.*

*Samtempe ekzistas ankaŭ individuoj kaj rondoj, kiuj estas bremsoj. Por ili pli gravas stabileco ol la evoluo.*

*Efektive interluktas du tendencoj: la aŭtonomeco, laŭ kiu oni severe limigis la novajn radikojn, argumentante, ke necesas fruktuzi maksimume la mirindajn latentojn de la vortfara rimedaro - la nacilingvoj, precipe latinidaj. Io simila okazas en aliaj lingvoj.*

*Estas bonege, ke ekzistas la du emoj kontraŭaj. La lingvo bezonas ambaŭ, ne mapli la deziron por evoluigo ol la konservativismon.*

*Sed en ĉio oni observu prudenton kaj la ĝustan mezuron, memorante, ke la Esperanta komunumo - kiun oni ofte (kaj prave) nomas popolo! - ne tolerus tion, kio minacus ĝian unuecon.*

*Al komencanto mi konsilus krome, ke tiu devus bone pripensi, ĉu li jam pretas decidi pri la dezirindeco enkonduki radikon novan.*

*Ofte la plispertiĝo pri la enstanta rimedaro de la lingvo, poste povas per si mem forigi la komencan emon trovi alternativon; ĉar intertempe oni sin adaptis al la etoso de Esperanto. Multo kiu en la unua stadio ŝajnas artefarita laŭgrade aspektiĝas tute natura.*

Krome, tre necesas ekscii kiuj radikoj troviĝas inter la neologismoj jam uzataj. Ne havus senceon enkondukadi por ili alternativojn, nur ĉar oni ne konas la proponojn de aliaj homoj.

La ordinara Esperantisto ĝenerale havas vortaron modestan, kiu sufiĉas por la celoj de la ĉiutaga vivo; sed dum la verkado de ĉi tio, kuŝas apud mi la Plena Ilustrita Vortaro. Ĝi konsistas el du kolumnoj de pli ol 1200 paĝoj. Aperas en ĝi proksimume 15 000 radikoj! Multaj el ili estas sciencaj kaj teknikaj, sed aliaj koncernas ĉiajn branĉojn de la ordinara vivo kaj, kompreneble, ankaŭ la literaturon.

Ekzemple, oni ordinare uzas la unusolan vorton banano; sed en tiu vortaro troviĝas ankaŭ pizango, ĉar temas pri du specoj de frukto iom diferencaj kvankam tre similaj. Parenteze, mi konstatis, ke ankaŭ en la afrikansa oni havas ambaŭ vortojn, kaj banana kaj piesang, malgraŭ ke plej ofte aŭdiĝas nur la ĉi-lasta! En la angla la korespondaj vortoj estas banana kaj plantain.

Alia ekzemplo. Konataj estas la sinonimaj loko kaj ejo. Nu, en tiu sama PIV mi antaŭ nelonge trovis ankaŭ la sinonimon lokal, kun signifo pli specifa.

Esperanto evoluas, konservante sian stabilecon.

Edwin de Kock (Akademiano)

### LABORPLANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(koncerne al la Internacia Jaro Por Paco)

Per sia rezolucio 37/16 de la 1982-a novembro 16, la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝinta Naciaro deklaris la jaron 1986 Internacia Jaro Por Paco. La ĝenerala sekretario de UN alvokis ankaŭ al Neregistaraj Organizoj partopreni la agadon ligo kun la Jaro. UEA entuziasme aliĝas al tiu gravega iniciato de la Ĝenerala Asembleo, kiu tiel forte kongruas kun la celoj kaj prioritatoj de UEA, precipe la akcelo de internacia interkompreniĝo, kaj ĝi akceptas la jenan Laborplanon:


1. La UK de Esperanto en 1986 estos aparte dediĉita al la LJ por P. La programo enkludu *koncerton por paco*, kiu eventuale prenu la lokon de

# ESPERANTO

## 1987

### KAJ

### S.E.A



PROTOKOLO DE SPECIALA KUNVENO DE LA SUDAFRIKA ESPERANTO-ASOCIO PRI LA CENTJARA JUBILEO DE ESPERANTO[La Sekretario raportas]

Invitilo por ĉeesti la kunvenon en Roodepoort (Transvalo) la 1985 01 31 estis sendita al ĉiu membro, fare de la Prezidanto, pere de s-ro Colin Beckford. Ĉeestis la membroj Edwin de Kock (Prez), d-ro Jan V D Strydom, Oscar Sher (Sek), Henri Appel, Johan Hammes, Lennart kaj Axel von Blotnitz, gesinjoroj Boglari (UEA-delegito por Svazilando kaj dumviva membro de SEA), kaj kiel nemembroj Julian Cloete.

1. Prezidis la kunvenon s-ro de Kock, kiu malfermis per klarigo, ke la komitato de SEA jam dum du jaroj pritraktis la preparojn por nia festado de la jubileo, kaj jam faris -

1.1 Skribajn petojn por specialaj ŝtataj poŝtmarkoj en 1987 al la 11 Poŝtestro-Generaloj de Sudafriko, Zimbabvo, Malavio, Transkaj, Ciskaj, Boputatsvano, Botsvano, Vendao, Svazilando, Lesoto kaj Namibio.

1.2 Intertrakton kun la Universitato de Pretorio laŭ kiu ni akiris skriban permeson lui taŭgan halon por unutaga publika simpozio dum la 1987-a aprila ferio.

1.3 Decidon, ke tutregiona Esperanto-kunveno okazu en 1987 aprile, kaj ke ĝi daŭru por tri tagoj, el kiuj unu estu publika simpozio, kaj du estu interna festo/kunveno ĉe lia propra bieneto.

1.4 Aranĝon, ke SEA eldonu la duan lernolibron en la afrikansa.

S-ro Ernest Venter jam tradukas nederlandlingvan lernolibron, kiu estos la bazo de ĝi. S-ro Appel atentigis pri la neceso havi sufiĉan stokon de afrikansaj lernolibroj por la kazo, ke nia komuna tutmonda kaj regiona porjubilea agado vekus grandan intereson pri Esperanto.

2. La publika simpozio ne havu kiel temon tiun, kiun la Komitato antaŭe menciis en siaj protokoloj, sed *INFORMA TAGO PRI ESPERANTO*. Eroj verŝajne



estos 2.1 Muziko

2.2 Literaturo

2.3 Historio

2.4 Rolo en Sudafriko

2.5 Lingva Diskriminacio

3. D-ro Strydom proponis, ke oni elektu subkomitaton, kiu speciale respondecas pri tiu publika simpozio (de nun mallonge SUKOSIMPO). Oni elektis John Williams, Julian Cloete, Estelle van Rensburg\*, Johan Hammes kaj d-ron Strydom. Tiu komitato raportos intertempe al la Komitato de SEA, sed post kiam starigos komitato speciale por ĉiuj faceto de la Jubileo, al tiu. Unu el la taskoj de SUKOSIMPO estas varbado/reklamado. Ni volas altiri kion eble plej multan publikon.

4. Johan Hammes prelegis pri la Laborplano por la Periodo 1983-1987 dum kiu ĉiu havis la tekston de la UEA-versio en la manoj. Oni decidis, ke ĝi servu kiel kadro laŭ kiu ĉiuj atingajoj kaj planoj estu raportotaj al eksterlando kaj ankaŭ al UEA (vidu p. 3). S-ro von Blottnitz cirkuladis la Memorlibron pri la 75-a Jubileo kaj avizis aktivulojn legi ĝin. Bonvolu akiri de d-ro Strydom, kiu unue prunteprenis ĝin.

5. La proponoj de neĉeestantoj estis legataj -

5.1 S-ro Felix Wolf petis, ke oni plibonigu la temon de la unutaga publika simpozio kaj pensu pri la tipo de la alcelataj partoprenantoj. Tion oni plenumis kiel ĉi-supre protokolata en 2.

5.2 S-ro Colin Beckford memorigas nin, ke unu el la ĉefaj de la tritaga subkontinenta kunveno estu la interkonatiĝo de izolitaj kaj foraj Esperantistoj kun la ceteraj. Por tio ni bezonas interkonatigan vesperon kun leĝera manĝado. Tion ĉiuj prilaudis. S-ro von Blottnitz proponis la portadon de nomŝildoj.

5.3 S-ro Edgar Sievers proponis, ke

5.3.1 La Komitato de SEA starigu prespretan *Manifeston* pri la funkcio de Esperanto por la sudafrika lingvosituacio.

5.3.2 Ni nepre enigu priesperantajn erojn en televidprogramojn, speciale ĵurnalajn.

5.3.3 Same - radioprogramojn.

5.3.4 Ni invitu ĵurnalistojn ĝustatempe al ĉiuj prelegoj kaj ekspozicioj.

5.4 S-ro Jooste perletere al s-ro de Kock proponis, ke movebla ekspozicio konstanta estu kreata, inkluzivante sonbendan enhavon, kiam ĉiu membro povu utiligi kiel kernon de loka ekspozicio.

5.5 Pastro Etulo Kruger proponis, ke jam nun oni komencu kolekti promesojn pri partopreno al la landa kunveno, por ke oni havu pli .

konkretan ideon pri la verŝajna nombro de partoprenantoj.

5.6 D-ro Burger (dentisto) ankaŭ senhezite diris, ke nepre nia plej grava agadkampo estas la televido. Li estas dumviva membro de SEA kaj lasas *BONA ESPERO* en sia atendejo tre proksima al la ĉefa televida konstruaĵo. Multaj el liaj pacientoj laboras por SABC/SAUK TV.

6. S-ro von Blottnitz proponis, ke

6.1 iam okazu fake pura interlingvistika simpozio.

6.2 ni ĉiuj propagandu konstante pere de la malmultekostaj personaj rimedoj kiel aŭtoafiŝo, stampilo kun favorata slogano, vizitkarto, signo ĉe surstrata pordo, aliaj afiŝoj, pingloj, ktp.

6.3 ni komencu ondon de periodaĵaj artikoloj, kiu konsiderinde kreku dum 1986 kaj kresĉendu en 1987 en lavango de prijubileaj raportoj. Nepre tia presajĵkampanjo devas esti kunordigata kaj regulata pere de centra respondeculo.

6.4 ni devas inviti/altiri ju pli da eksterlandanoj des pli bone al nia regiona kunveno, speciale el afrikaj landoj. Tiu ankaŭ bezonas kunordiganton.

6.5 ni devas instigi, ke en ĉiuj altlernejoj Esperanto estu ofertata kiel taŭga temo por la tradicia debatkonkurso.

7. La Speciala Kunveno pledas nun al ĉiuj samideanoj en nia regiono, speciale ankaŭ tiujn, kiuj ankoraŭ ne perfekte regas la lingvon kaj al la izolitaj, proponi sin aŭ aliajn por la jenaj respondecoj -

7.1 Kunordiganton por TV aperigo: F-ino Erna du Toit, Tomstraat 61, Potchefstroom. Telefone 6130 (hejmo) aŭ 22211 (deĵoro), kodo 01481 (X).

7.2 Kunordiganton por periodaĵa artikolkampanjo: ?

7.3 Kunordiganton por radia disaŭdigo: ?

7.4 Respondeculon por la kunmeto kaj estrado de la Joosta konstanta movebla ekspoziciaĵo: ?

7.5 Listiganton de ĉiuj promesoj pri partopreno: ?

7.6 Specialiston pri afiŝoj, pingloj, plakaĵoj, stampiloj, surpris-taj ĉemizoj, murkarto, flagoj ktp kiu stokas, propagande aĉetas kaj fabrikas por forvendo kun financa helpo de SEA\*\*:

7.7 Kunordiganton pri eksterlandaj vizitantoj: ?

7.8 Kunordiganton de apogo al ĉiuj instruistoj, kiuj prizorgas la jaran debatkonkurson, oferti Esperanton kiel elekteblan temon: ?

7.9 Komitatanoj por la aranĝoj dum la du tagoj de interna festado.

Eble kvar ĝis sep. La ĉi-supraj 12 ĝis 15 respondeculoj, kun la kvin membroj de SUKOSIMPO, estos la gvida komitato por la Jubileaj aranĝoj, kaj devas elekti el inter si prezidanton, sekretarion kaj kasiston.

Oni unuanime akceptis ĉiujn proponojn, inkluzive tiun de s-ro de Kock, ke ĉi tiu protokolo/alvoko aperu en *BONA ESPERO*.

- \* Estelle van Rensburg intertempe bedaŭre klarigis, ke ŝi ne povas akcepti.
- \*\* Li ankaŭ devas distribui la tri (malfeliĉe) signojn por la Jubilea Festado (unu de NEM kaj du de UEA)

La Sekretario de Sudafrika Esperanto-Asocio  
O Sher

\* \* \* \* \*

Red. Bonvolu turni vin al la Sekretario ĉe -  
Bronkhorststraat 75  
GROENKLOOF  
0181

## 3 + + [Laborplano de UEA]

la tradicia Internacia Vespero.

2. La Asocio organizu *Simpozion pri Paco* en la formo de seso da artikoloj kiuj aperu en la oficiala organo de UEA en 1986 (aŭ en KONTAKTO) kaj traktu aspektojn de paco. Ili estu verkitaj de konataj Esperanto-aŭtoroj.
3. Aperu nova eldono de la *ESPERANTO-DOKUMENTO* pri la kontribuo de la Esperanto-movado al paco.
4. UEA eldonu broŝuron pri paco kaj kompreniĝo, eventuale utiligante la supre menciitan artikolserion, kaj metu ĝin je la dispono de landaj asocioj kaj lokaj grupoj por helpi ilin en la planado de agadoj lige kun la Jaro.
5. UEA aperigu specialan 'kompleton' en Esperanto pri instruado pri paco, por utiligo de Esperantistaj instruistoj. Ĝi enhavu taŭgajn dokumentojn kaj instrumaterialojn.
6. La Novjorka Oficejo de UEA servu kiel ĉefa kunordiganto de la laboro de UEA lige kun la Jaro, aperigu serion da bazaj artikoloj por utiligo de la Esperanto-gazetaro, kaj helpu kunordigi la agadon je nacia kaj fakaj niveloj.
7. UEA esploru la eblecon aperigi malgrandan antologion de Esperanto-poemoj pri la paco kaj pri interkompreniĝo, eventuale kun nacilingvaj prozaj tradukoj, eble en kelkaj dulingvaj eldonoj.
8. Por 1985 estu starigita speciala 'branĉo pri paco' en la Belartaj Konkursoj. Estu akceptitaj konkursaĵoj en iuj ajn el la ĝenroj kovritaj de la aliaj branĉoj. Konkursaĵojn por ĉi tiu branĉo oni povu samtempe ankaŭ proponi por l el la aliaj branĉoj.

### MONDA LOĜANTARO

La kresko de la monda loĝantaro rekte rilatas al la ŝanĝiĝo de la proporcioj de la naciaj lingvoj. La kresko de la monda loĝantaro rekte implicas la kreskon de la komunika problemo. Eble utilos al pluraj el ni kiuj emas kalkuli la nombrojn de la parolantoj de naciaj lingvoj la jenaj ciferoj. Temas pri la 25 popole plej grandaj landoj en 1984. Ili kune formas 79,2% de la monda loĝantaro. La landoj kun asterisko estas konsiderataj de UN kiel 'pli evoluintaj'. (Tabelo I). Krome utilis la ciferoj por la 25 plej popole grandaj landoj en la jaro 2025 (Tabelo II) kaj kiuj formos 76,0% de la tiam monda loĝantaro:

I: 1984-a LOGANTARO

1. Ĉinio.....	1051,6
2. Hindunio.....	746,7
3. Sovetunio*.....	275,8
4. Usono*.....	235,7
5. Indonezio.....	162,2
6. Brazilo.....	132,6
7. Japanio*.....	119,5
8. Pakistano.....	99,0
9. Bangladeŝo.....	98,5
10. Niĝerio.....	77,0
11. Meksiko.....	77,0
12. FRG*.....	61,2
13. Vjetnamo.....	58,3
14. Italio*.....	56,7
15. Britio*.....	55,6
16. Francio*.....	54,6
17. Filipino.....	53,4
18. Tajlando.....	50,6
19. Turkio.....	48,8
20. Egiptio.....	45,7
21. Irano.....	43,8
22. Korea Resp.....	40,3
23. Hispanio*.....	38,7
24. Birmo.....	38,5
25. Polujo*.....	37,2

II: 2025-a LOGANTARO

1. Ĉinio.....	1460,1
2. Hindunio.....	1188,5
3. Sovetunio*.....	367,1
4. Niĝerio.....	338,1
5. Usono*.....	312,7
6. Indonezio.....	225,3
7. Brazilo.....	245,8
8. Bangladeŝo.....	219,4
9. Pakistano.....	212,8
10. Meksiko.....	154,1
11. Japanio*.....	127,6
12. Etiopio.....	112,0
13. Vjetnamo.....	105,1
14. Zairo.....	104,4
15. Filipino.....	102,3
16. Turkio.....	99,3
17. Egiptio.....	97,4
18. Irano.....	96,2
19. Tajlando.....	86,3
20. Tanzanio.....	83,8
21. Kenjo.....	82,9
22. Birmo.....	82,2
23. Sudafriko.....	76,3
24. Maroko.....	59,9
25. Korea Resp.....	58,6

[La nombroj estas en milionoj da homoj]

E1 UN KAJ NI

~ • ~

MODERNA ALEGORIO

Iam vivis ruĝa kokineto, kiu en la bienkorto ĝratis ĝis ŝi malkovris kelkajn tritik-grajnojn. Ŝi tuj pensis, ke estos bona ideo planti la grajnojn, kaj demandis al la najbaroj kiuj el ili helpos.

`Ne mi' diris la ansero.  
 `Ne mi' diris la bovino.  
 `Ne mi' diris la porko.  
 `Kaj ne mi' diris la anaso.

Do, la ruĝa kokineto mem plantis la semojn. Post nelonge la tritiko maturiĝis kaj fariĝis necesa falĉi ĝin. Ŝi tiam demandis pri kiuj helpos tion fari.

`Ne mi' diris la ansero.  
 `Esats ekster mia klasifiko' diris la bovino.  
 `Mi perdos mian superecon' diris la porko.  
 `Kaj mi perdos mian subvencion pro senlaboreco' diris la anaso.

Do, la ruĝa kokineto mem elfaris ĝin.

Post la rikolto ŝi opiniis bona ideo baki iom da pano, do demandis al la aliaj pri kiuj el ili helpos en tio.

`Tio estus kromlaboro por mi' diris la ansero.  
 `Mi perdus miajn bonfart-krompagojn' diris la bovino.  
 `Mi estas forfalanto kaj neniam lernis fari tion' diris la porko.  
 `Kaj mi estas nur helpanto kaj tio estus nur diskriminacio' diris la anaso.

Do la ruĝa kokineto mem elfaris ĝin. Ĉion farinte, ŝi alten-tenis varman, novbakitan panbulon por ke la aliaj vidu ĝin. Kompreneble ili deziris iom da ĝi, sed la ruĝa kokineto diris, ke ŝi manĝos ĝin mem.

`Ekscesaj profitoj' diris la ansero.  
 `Kapitalismo' kriis la bovino.  
 `Mi postulas egalajn rajtojn' laŭtkriis la anaso.  
 Kaj la porko nur gruntis.

La bestoj tiam senprokraste pentris 'neĝuste' striktabulojn kaj ripetade ĉirkaŭmarŝis la domon de la ruĝa kokineto, kriante malĝentilaĵojn. Baldaŭ alvenis ŝtatagento, dirante al la ruĝa kokineto: `Ne estu avida'.

'Sed mi perlaboris ĉi tiun panon'. protestis la ruĝa kokineto 'mi mem ĉion faris'.

'Ĝuste' diris la agenteo 'tio estas la mirinda, privatentreprenebla sistemo. Kiu ajn sur la bienkorto rajtas gajni tiom, kiom li volas. Sed laŭ la modernaj registraraj reguloj la produktivaj laboristoj devas dividi kun tiuj, kiuj estas mallaboremaj'.

Kaj ĉiuj por ĉiam feliĉe vivis, inkluzive de la ruĝa kokineto, kiu ridetis kaj klukis: 'Mi estas danko, mi estas danko'.

Sed ĉiuj ŝiaj najbaroj scivolis kial la ruĝa kokineto neniam plu bakis panon.

Colin Beckford (Tradukita el *JAYCEE LEADER*)

•••

### KIO PLEJE VENDIĜIS DUM 1984

Jen ĉi-sube la listo de libroj, kiuj pleje vendiĝis tra la Libroservo de UEA dum la pasinta jaro:

1. *Faktoj kaj fantazioj* (Boulton)
2. *Kiuj semas plorante* (Tófalvi/Kníchal)
3. *La lingva esenco de Esperanto* (Atanasov)
4. *Esperanta antologio* (red. Auld)
5. *Esperanto aŭtodidakte* (Childs-Mee)
6. *Plena analiza gramatiko* (Kalocsay/Waringhien)
7. *Ĉu vi konas la teron?* (Dudich)
8. *Elpafu la sagon* (Sekelj)
9. *Praktika bildvortaro de Esperanto*
10. *Vivo de....Zamenhof en bildoj* (Thien)
11. *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto* (Wells)
12. *Karlo* (Privat)
13. *Paŝoj al plena posedo* (Auld)
14. *Gerda malaperis!* (Piron)
15. *Distributed language translation* (Witkam)
16. *Kumeúáúá, filo de ĝangalo* (Sekelj)
17. *Diccionario de bolsillo* (Paluzie-Borrell)
18. *Esperanto and English Dictionary* (Wells)

19. *Rakontoj pri Afanti*  
 20. *Plena ilustrita vortaro* (Waringhien)



### DOKUMENTA TELEVIDA FILMO


La studioj por televidaj filmoj EKRAN en Sofio kreis 25-minutan 16-mm koloran filmon, kiu titoliĝas *Leciono de Esperanto*. Tio estas la unua bulgara profesia filmo kies ĉefa estas la disvastigo de antingaĵoj de la Internacia Lingvo en Bulgario ekde la unuaj jaroj de la jarcento ĝis hodiaŭ. Por montri kaj pruvi la internaciecon de Esperanto en Budapeŝto la aŭtoroj filmis momentojn el la 68-a UK en tiu urbo, unu el la plej amase vizititaj en la preskaŭ centjara historio de la monda Esperanto-movado.

La eŝo de la publiko estis tre vigla kaj granda. Multajn laŭdajn leterojn ricevis la Bulgara Televido kaj la Centra Oficejo de Bulgara Esperantista Asocio. Tio ja pruvas la grandan intereson kiun la filmo vekis kaj kuraĝigas la filmagantojn serĉi novajn temojn pri Esperanto.

Ankaŭ Pollando vidigis filmon pri Esperanto antaŭ nelonge. La filmon de la Pola Televido estis farita en la bienlernejo BONA ESPERO en Brazilo. Ĝi ricevis la plej altan noton de la juĝkomisio de la Pola Televido kiu jam sendis ĝin al la Filmofestivalo de Gevilla (Hispanio).

...o...

### EL LA SCIENCO



Post nelonge astronomia evento okazos kiun multaj homoj jam delonge atendas. Je la fino de 1985 la kometo de Halley vizitos la ĉirkaŭaĵon de nia suno kaj tero denove. Kiel en la pasinteco ĉi tiu fama kometo estos



videbla per la nuda okulo.

La kometo de Halley havas longan historion. Jam en la jaro 240 a.K. la ĉinoj vidis ĝin. Skribitaj verkoj ekzistas pri ĉiuj ĝiaj aperoj escepte pri la vizito de 164 a.K. Post la aperoj de 1531, 1607 kaj 1682 Edmund Halley faris kalkulojn kaj prognozis, ke la kometo denove venos malfrue en 1758 aŭ frue en 1759. Je Kristnasko 1758 (16 jarojn post la morto de Halley) amatora astronomo, Johann Palitzsch vidis ĝin. Ekde tiam la kometo akiris la nomon de Halley kaj aperas post ĉirkaŭ 74 ĝis 79 jaroj.

En decembro 1985 la kometo estos videbla per binoklo post sunsubiro (1/2 ĝis 1 horo) sur la nord-okcidenta horizonto.

Dum januaro 1986 la kometo estos videbla sur la okcidenta horizonto per la nuda okulo. Bedaŭrinde la krepusko entrudiĝos.

La lastan duonon de februaro 1986 la kometo aperos denove - nun ĉe la alia flanko de la suno. Ĝi estos videbla ± 1/2 ĝis 1 horo antaŭ la sunleviĝo kaj en la orient-sudoriento. Ĉar la kometo movas en pli suda direkto, ĝi estos pli bone videbla de la suda hemisfero ol de la norda. Je ĉi tiu tempo ĝi estos tre grandioza spektaklo.

Je la dua semajno de marto la vosto plilongiĝos kaj la kometo estos pli alta matene. Je la fino de marto aŭ je la aprila komenco la kometo atingos la plej proksiman lokon al Tero kaj estos tiam je ĝia plej brila. Poste ĝi movos de la sudoriento sudokcidenten.

En la mezo de aprilo la kometo ekmalbriliĝos tiam estante videbla en la sudokcidento matene, sed ankaŭ denove en la sudoriento vespere. Post unu semajno ĝi estos videbla nur vespere.

Dum la sekvantaj monatoj la kometo de Halley malbriliĝos

ĝis unue videbla per binoklo sed poste nur per teleskopo.

La plej bona tempo por rigardi la kometon estos dum malluma nokto kaj for de iuj lumoj. Ne rapidu - la okuloj bezonas ĉ. 15 minutojn por alkutimiĝi al la mallumo! Eble la kometo ne fariĝos tiel hela kiel en 1910 (tiam kun vosto pli ol 120 gradoj kaj tiel brila kiel la Laktovojo), tamen la apero estos tre grava okazaĵo kaj oni avide atendas ĝin. Por la plimulto el ni ĉi tiu estos la sola ŝanco por admiri nian gloran ĉielan vizitanton.

Johan de Klerk



Argentino: En la fakultato de humanismo de Universitato de Rosario la dekanino decidis starigi regulan libervolan kurson de Esperanto. Por informi la studentaron oni prezentis 40-minutan aŭd-vidan programon pri la 66-a UK en Brazilo. Oni raportas pri granda entuziasmo.

Aŭstrio: La 97-ekzemplera ilustrita gazeto *Lebendiges Linz* aperigis unupaĝan artikolon pri Zamenhof far s-ino Elisabeth Oberlik.

Britio: Okaze de la 50-a Jubilea Brita Esperanto-Kongreso la magistrato de Norwich decidis nomi centre lokitan prom-vojon ESPERANTO WAY. Tiu Kongreso okazis en 1966. Tamen la nuna magistrato decidis forigi tiun nomon. Eventualajn protestojn oni sendu al City Council, City Hall, Norwich, Norfolk, Britio.

Bengalio: La loka televida stacio de Kalkato elsendis 30-minutan programon pri Esperanto. Preskaŭ ĉiu ĵurnalo en la urbo recenzis la programon. Tiel granda estis la rikolto de intereso, ke la Federacio Esperanto de Bharato en Kalkato ne havis sufiĉajn lokojn por ĉiuj en sia klasĉambro.

KONTRIBUAS HUNGARA SAMIDEANO

Mia Sinjoro!  
 Mi dankas al vi la Teron  
 kiu akceptas la semon  
 kaj min, se mi estos enterigata  
 Benu mian infanon!

Mia Sinjoro!  
 Mi dankas al vi la Ĉielon  
 sur kiu vi sendas nubon  
 vivigante pluvon aŭ glacipunfrapon  
 Benu mian infanon!

Mia Sinjoro!  
 Mi dankas al vi la Sunon  
 kiu vokas el la tero la vivon  
 kaj kiu forbruligas tion  
 Benu mian infanon!

Mia Sinjoro!  
 Mi dankas al vi Mian Senmortecon  
 mi portas en miaj brakoj vian promeson  
 Vi savos nin de la perfortuloj,  
 de la satanaj malsaĝuloj, kiuj ludas Dion  
 Benu! Benu mian infanon!

Dávid Rózsa (Budapest)

\* \* \*

EDZINA FIASKO

Petro, starante ĉe la pordo de la ĉielo, kontrolas la alvenantajn animojn.

`Ĉu vi edziĝis surtere?' li demandis al unu viro.

`Ne' tiu fiere respondis, `mi restis fraŭlo dum la tuta vivo'.

EL NIA POEZIO

'Laŭ peto de nia kantisto, d-ro Jan Strydom, kiu volas surbendigi Esperantigojn de kantoj el la afrikansa.....':

NOSTALGIO

J R L van Bruggen

*La kor' sopiras silenton  
de la vasta, herba kampar',  
for de la urbobruoj  
kaj tindado de mono kaj var'*

*Mi lacegas pro viv' senripoza  
de homoj en ir' kaj ven',  
min relogas liberaj spacoj  
kie loĝas kor' kun kompren'.*


*Mi revidas la sunon sur stepo  
kaj lazuron en distoj for,  
kaj l'okuloj revoplenas  
kaj nenostalgias la koro...*

*La okuloj revoplenas,  
nostalgias al mi la koro.*

*Mi vidas denove montbluon  
lontane kaj en memor',  
nek miras ĉar el miaj kantoj  
sogrimpas sopir' kaj dolor';*

*Son al Ĉielogrizo  
kaj altaĵoj en distofum';  
Ĉar ho mi sopiras al stepo  
kaj l'eterna sunbrila lum'.*



VENTERAĴOJ

En Ĉilio laŭdire estas malnova kutimo ke - se iu aventurema Don Huan klopodas influi virinon kun si sekskuniĝi - la nedecema ino ĝenerale respondas 'Insekto ree mordis vin', 'Ĉu insekto mordis vin?' aŭ per iu simila diraĵo. Kleruloj

ĝenerale opiniis tion stulta kaj kampara superstiĉo..... ĝis antaŭ nelonge.

Kutime la fora sudo de la lando ĝuadas abundan pluvon. Dum 1983 tamen la vivodonaj pluvoj tute forestis. Malsato minacis sed eĉ pli malagrabla estis la ekapero de milionoj da venenaj araneroj. La efiko ĉe viroj kiuj mordiĝis de la araneoj estas speciale notinda tial, ke rezultiĝis en ili neklarigebla longedaŭra malmoliĝo kaj pligrandiĝo de la penisoj kaj skrotoj (testiklopoŝo). Pro la treega doloro rezulte de la veneno, centoj da viroj trovis sin en malsanejoj kaj kompreneble en tiu stato tute ne sopiris virinojn. La infera doloro restis ĝis la protekta sistemo korpa sukcesis forigi la venenon. Tamen la aludo al 'mordo de insekto' estas malnova kutimo delonga kaj la ĉi-supro okazis nur antaŭ nelonge!

E S Venter




---

RAPORTO DE LA PORTELIZABETA ESPERANTO-KLUBO POR LA JARO 1984

Dum la periodo aprilo 1984 ĝis marto 1985 PEK ĝuis agadplenan periodon. La klubanoj regulbaze kunvenis pro diversaj kialoj krom pro la kutimaj ĉiusemajnaj instruperiodoj. La klubo - fine de februaro ĉi-jare - havis 10 membrojn, inkluzive de universitata docento, lernejoj instruistoj,

15 ←← [La mondo]

Belgio: La dua nederlandlingva kanalo de la Belga Televido, BRT2 elsendis 10-minutan programeron pri Esperanto en la ideala elsendotempo tuj post la oka vespere. Reage al la rekta demando: 'Ĉu viaj esperoj pri la lingvo ne fiaskis?' la prezidanto de UEA lerte aludis la kreskantan multlingvecon en Eŭropa Komunumo por fini per la rebato: 'Provu sencohave ligi la popolojn de Eŭropo per nur etnaj lingvoj - tie vere kuŝas la fiasko!'.

Mondo: Montriĝis, ke la nombro de horoj da Esperantaj radio-elsendoj pasintjare atingis novan rekordon. Dek stacioj en naŭ landoj disaŭdigis 4 400 elsendojn kiuj daŭris 1 899 horojn.

♦♦♦

18 ←← [PEK raporto]

universitataj studentoj kaj aliaj. El la 10 membroj, 8 estas membroj de SEA.

PEK ĝoje raportas la jenajn pri la ĉi-supre menciita periodo:

1. 84 08 09 - Aperas en *ALGOA SUN* propaganda artikolo de Adèle Fouché.
2. 84 08 13 - Komenciĝas nova klaso por komencantoj.
3. 84 09 12 - Rodney Burke de *SABC/SAUK* intervjuas Adèle Fouché pri Esperanto en la radio programo *AUDIOMIX*.
4. 84 09 23 - Adèle Fouché lekcias la lernantinojn de *ERICA SCHOOL* pri la grava komunikilo Esperanto.
5. 84 12 10 - Okazas jarfina sociala (plezurplena!) kunveno ĉe la hejmo de Cobus Zeelie. La klubanoj ĝuis diversajn ludojn celitajn je la pligrandigo de la vortostoko. La tre amuzaj ludoj kaŭzis multajn ekridegojn. Dum orgenludado de Cobus Zeelie ni laŭte kunkantis Esperantlingve. Ni finis la vesperon per manĝofesto aranĝita de la klubanoj.
6. 85 03 11 - Spektas TV filmon pri Esperanto 13 personoj hejme de Rae Blass. Ĉeestis inter aliaj remedia instruistino de *THEODOR HERZL SCHOOL* kaj aliaj ne-Esperantistoj. Du gastoj estis studentoj de la loka universitato, kiuj komencos stu-

di private el *TEACH YOURSELF ESPERANTO*.

7. La redaktado de *BONA ESPERO* glate progresas sed urĝe bezoniĝas kunlaborantoj kies tasko estos i.a. la ensendado de artikoloj ne aperintaj en aliaj Esperanto-gazetoj. La artikoloj povas esti originalaj aŭ tradukitaj.

8. PEK planas kun la helpo de la Redakcio de ĉi tiu revuo eldoni memolibron pri la historio de la Interlingvo en Sudafriko. Kondiĉe, ke la klubo ricevos sufiĉe da laŭeble ĝenerala informo, ĝi aperos dum la centjara festo de Esperanto. Ni kaptas ĉi tiun okazon peti, ke ĉiuj laŭeble ensendu informon pri Esperantaj unua-aĵoj kaj aliaĵoj de intereso al la redakcio:

- 8.1 Starigoj de kluboj, societoj, asocioj, revuoj ktp kaj ties membranj nombroj.
- 8.2 *BONA ESPERO* - fondiĝo, evoluo, redaktoroj, al kiuj landoj/kluboj/asocioj ĝi sendiĝis tra la jaroj, ktp.
- 8.3 Libroj kiuj verkiĝis, aŭ originale aŭ traduke. Aŭtoroj, datoj, enhavoj ktp.
- 8.4 Rezentadoj ĉe kongresoj diverslandaj, kaj ĉe UKoj.
- 8.5 UEA delegitoj, ties fakoj ktp tra la jaroj.
- 8.6 Pri SEA, ĉioj.
- 8.7 Akademiaj aferoj.
- 8.8 Kursoklasoj, korespondkursoj ktp.
- 8.9 Vizitoj de eksterlandaj Esperantistoj.
- 8.10 Radio-programoj pri Esperanto, datoj, programonomoj ktp.
- 8.11 Gravaj artikoloj en ne-Esperantistaj gazetoj sudafrikaj, datoj, nomoj ktp.
- 8.12 Iuj ajn aliaj novaĵaj informoj.

Ĉiun informon oni sendu al la Redaktoro de *BONA ESPERO*.

Adèle Fouché (Sekretariino de PEK)

+++

### DANK-LETERO AL ĈIUJ KOMITATANOJ KAJ KUNLABORANTOJ

De tempo al tempo mi ricevas artikolojn de SEA-anoj. Bonvolu kompreni, ke kvankam la Redakcio tre alte taksas vian helpon pluvivigi nian revuon kaj sincere deziras sendi al vi ĉiuj dank-leteron, tio ne eblas pro severa manko de libera tempo.



PENSETOJ EL L'VIVO

: La nacioj de la mondo estas tiel strangaj! Iu nacio ĉiam emas scii pli ol alia, esti pli riĉa ol alia, esti pli forta ol alia ktp. Sed, ĉu vi iam pripensis iliajn evoluojn? De sklaveco ĝis spiritaj vekigo kaj kredo - de kredo ĝis kuraĝo - de kuraĝo ĝis libereco - de libereco ĝis trooj - de trooj ĝis egoismo - de egoismo ĝis memkontento - de memkontento ĝis neatentemo - de neatentemo ĝis dependo - de dependo ĝis sklaveco.....

: Tri viroj estas laborantaj kiam preterpasanto demandas ilin - 'Kion vi faras?'

Respondas la unua - 'Mi gajnas monon por resti viva'.

Respondas la dua - 'Ĉu vi ne povas vidi, ke mi movas ŝtonojn?'

Respondas la tria kun fiera rideto - 'Mi helpas konstrui preĝejon!'


Kvankam ĉiuj faras la saman taskon, ĉiu havas sian propran opinion pri la tasko. Al la unua la tasko estas nura maniero enspezi monon; al la dua, enuiga; al la tria, ĝojo en kiu li havas ŝancon partopreni.

Laboro povas feliĉigi la homon nur se li povas vidi en la tasko la kreajn aspekton kaj kialon pri kiuj li okupas sin. Vere feliĉa homo malofte estas senfara. Feliĉo estas flanka produktaĵo de krea agado.

: La spirito estas ĉio: kiaj la pensoj, tia la homo.

: Homo sen mono estas malriĉa, sed homo kun nur mono multege pli malriĉa.

: Vortoj estas tiel strangaj. Ili kostas nenion, sed donas tiel multon. Ili ne brulas la lipojn aŭ langon, tamen povas tion fari al la koro. Ili povas riĉigi, sed ĝuste tiel facile malriĉigi. Vortoj estas tiel strangaj.....







"Ne permesate, via moŝto. La akuzito kondukas la atestanton!"



"Jes, mi tute certas, ke ni havas problemon!"



"Ĉu ankoraŭ falsatesto se mi krucigas la fingrojn?"

RIDETU





16 ← ← [Edzina fiasko]

'Foriru en la inferon' Petro rifuzis lin, 'kaj trapasu la eternan punfajron!'

Al la dua en la vico Petro demandis same.

'Jes, mi ja estis edzo' tiu humile respondis.

'Bonvenon' Petro milde invitis lin, 'eniru la ĉielon, ĉar vi jam dumvive suefris la purgatorion'.

'Enlasu min' la tria en la vico gaje ekkriis, neatendante la demandon, 'mi eĉ dufoje edziĝis kaj suferis multe pro miaj pekoj jam dum la vivo'.

Sed tondravoĉe Petro baris al li la vojon: 'Por stultuloj la Ĝardeno de la Paradizo certe ne estas.....'



## RECENZO



*Diskriminacio*. Diversaj aŭtoroj. Formato A5 (210mm), 175 paĝoj, ISBN 92 9017 031 X, prezo 21 guldenoj plus sendokostoj. Eldona Fako de UEA.

*Diskriminacio* estas kolekto de i.a. 23 prelegoj kaj komentarioj pri la kongresa temo de la 65-a UK, Stokholmo, aranĝitaj de d-ro Renato Corsetti.

Ĝi traktas la radikojn de diskriminacio, diskriminacion kontraŭ etnoj kaj raso, internacian ekonomian diskriminacion, diskriminacion kontraŭ virinoj, diskriminacion pro seksa orientiĝo aŭ religio, maldiskriminacion kaj lingvan diskriminacion.

Kontribuis i.a. John Wells (Britio), Probal Dashgupta (Hinda Unio), Uwe Moritz (FRG), Guy Héraud (Francio), Werner Bormann (FRG), Ante Ferencić (Jugoslavio), Anna Brennan (Italio), Birgitta Wistrand (Svedio), Ĵila Sadigi (Irano) B kaj R Eakins (Usono), Luisa Hoffmann (FRG), Pieter de Graaff (Nederlando), Albert Goodheir (Britio), Zeng Heyao (Ĉinio), Umeda Yosimi (Japanio) kaj Nikolai Zubkov (Soveta Unio).

La Esperanto-movado kontraŭbatalas la lingvan kaj kulturan

JAPANO VIZITAS PEK

La finon de majo alvenis en la Portelizabeta haveno la japana ŝipo *Osaka Maru*, portante kun ĝi s-ron Takashi Kawai, ĉefenĝinieron kaj Esperantiston. La ŝipo vizitis en Sudafriko la havenojn de Durbano, Kaburbo kaj Portelizabeto. En PE la membroj de PEK havis la honoron renkontiĝi kun s-ro Kawai kaj lia amiko, la ŝipa kuracisto, d-ro Munetoshi Nagasaki.

S-ro Kawai zorge informis la klubanojn pri la Esperantista vivo en Japanio kaj ankaŭ kiel li lernis la Interlingvon pere de Japana-Esperanta Vortaro! Li aldone priskribis sian ŝipon kaj la diversajn landojn vizititajn kaj vizitotajn.

La finon de julio la ŝipo refoje trapasos unu nokton en nia urbo kaj por tiu vespero s-ro Kawai aranĝis rondiron tra la grandioza ŝipo. La PEKanoj jam ne povas atendi tiun vesperon promesitan esti tre interesplena!

Post la speciala kunveno la klubanoj kaj gastoj ĝuis manĝaĵojn afable preparitajn de la PEKanoj. Niaj gastoj salutis nin ĝis la revido fine de julio kaj forlasis prepari sin por la vojaĝo al Kaburbo je la kvina horo matene de la venonta tago.


S-ro Kawai loĝas en la urbo Nagoya kiu situas inter Osaka kaj Yokohama, Japanio.

川  
合  
2  
3  
4  
2  
1  
X

Adèle Fouché (Sekretariino de PEK)

# THE LIFE OF GANDHI

Translated by D. THRELFALL



++ 24

diskriminacion. Ĉi tiu eldono diskutigas kaj klerigas ankaŭ pri aliaj diskriminacioj. Tiel ĝi invitas al pliaj kontaktoj kaj kunlaboro inter la Esperanto-movado kaj organizaĵoj kiuj aktive kontraŭas tiujn aliajn specojn de diskriminacio. Por tia plua agado donas konkretajn proponojn *Diskriminacio*.

---

### ANONCOJ

: Internacia Centro Esperantista Socia Laborkomitato, ul. Broniewskiego 50/9, 59-700 BolesławiecSlaski, Pollando invitas du personojn kaj certigas senpagan vivtenon/nutradon/tranoktojn/patroprenon en Esperantaĵoj. Periodo - julio aŭ aŭgusto 1985.

: En junio pasintjare Eleonora Worsztynowicz prezentis ĉe la Universitato de Poznań sian licencian disertacion *Kolektoj de Esperantaj Eldonaĵoj*. Alte aprezite de la Libroscienca Instituto kaj polaj Esperantologoj, ĝi donas multflankan analizon laŭ historia kaj nuna stato, kaj ankaŭ eltiras konkludojn por la estonto lige kun la centjariĝo de Esperanto. Sia adreso estas ul. Poznańska 26/37, PL 63-100 Śrem, Pollando.



: Se ie en la mondo estas familioj kiuj kompilas/is siajn genealogiojn kaj deziras fondi familiajn Esperanto-klubojn kiel la familio Worsztynowicz, tiuj kontaktu Familion Worsztynowicz, P O Fakto 311, PL 50-950 Wrocław 2, Pollando.

: Vroclava Filio de Pola Esperanto-Asocio invitas al tradiciaj Esperantistaj feriadoj en Miedzygórze, kie okazos 1985 08 18-31 la Kvara Internacia Feriado 'Esperanto Hejme' kaj 1985 09 2-15 la Dudek-unua Internacia Esperantista Feriado 'Ora Pola Aŭtuno'. En ĉiu feriskipo samtempe ferios 430 Esperantistoj. Pli da informo de la Redakcio.

: UEA UK - ĝis la mezo de marto aliĝis 1475 homoj el 47 landoj. FR Germanio 394, Francio 185, Nederlando 132, kaj kun pli ol 50 Italio, Svedio, Hungario, Usono, Belgio kaj Britio laŭ vicordo. Aliaj respektindaj kontentigoj estos liveritaj de Finnlando, Jugoslavio kaj Japanio.

: Ekzempleroj de *Esperanto* ekde 1962 estas haveblaj de Colin Beckford ĉe P O Box 1227, Kaburbo, 8000.

: La gravan verkon de Edmond Privat (1889-1962) tradukis anglalingven Dorothy Threlfall de Aŭstralio - *The Life of Ghandi*. ISBN 0 86445 016 8, A5-formata, 123-paĝa. Bele presita kaj altgrada papero. Enketojn al la Sekretario de SEA, Bronkhorst Strato 75, Groenkloof, 0181. La aŭtorino bone sukcesis traduki verkon enhavantan la denaskan ĝismortan vivon de Ghandi, malfeliĉojn, feliĉojn. La parto de lia vivo en Sudafriko forte rolas en la verko kaj se oni ankoraŭ ne legis la originalan aŭ pli bone scipovas kaj tial plivolas la tradukitan version anglalingvan, nepre aĉetu ekzempleron. Po R7 00 oni ne rajtas ne aĉeti ekzempleron, do tuj agu! SEA disponas nur kelkajn. Vidu ankaŭ sur paĝon 26.

: La nomoj de la Kunlaborantoj de *BONA ESPERO* iomete ŝanĝiĝis. Vidu la redakcian paĝon.

: *EMISTUDIO*, 765 Braemar Avenue, Sidney, B.C., V8L 3S1, Kanado helpe de la Kanada Esperanto-Asocio faris tri TV filmojn por hejmuizado. La formato estas VHS kaj ili kostas-\$25....*The World of Esperanto with Steve Allen* (duonhora)  
\$40....*The World of Esperanto with Wally du Temple* (unuhora, intervjuo, kanzonoj, inkluzivas la tutan \$25 filmon)  
\$40....*Veselin Damjanor koncertas en Pearson Kolegio de la Pacifiko* (unuhora, kantoj, kanzonoj, intervjuo)



La sudafrica Esperanto-asocio  
 bezonas vian kunlaboron. Sur  
 paĝoj - vi povas eltrovi  
 kiel vi, via klubo, via soci-  
 eto kaj aliaj povas ludi gra-  
 van rolon certigi sukceson ne  
 nur al la landa planata jubi-  
 lea festo, sed ankaŭ al la  
 pluekzisto kaj disvastigo de  
 la Interlingvo en Sudafriko.  
 Ne prokrastu. Tuj agu!!!!!!!



SEA

ESPERANTO

JUBILEA FESTADO

~1987~




L'inkpoto



: Magdalena Wrocławska, 14-jara lernantino, Grabonóg 62/1, PL 63-820 Piaski, Pollando. Deziras korespondi kun sudafricano pri la literaturo kaj kolekti poŝtkartojn/poŝtmarkojn.

: Ramon Astrada, Est.7, Malvinas Argentina 1475, 5900 Villa Maria (CBA), R. Argentino jam trifoje skribis al SEA por trovi korespondamikon en nia lando. Ĉu nenie en Sudafriko estas samideano kiu volas esti plumamiko de Ramon?!

: Barbro Haraldsson de Furugatan 10, S-252 30 Helsingborg, Svedio estas sinjorino kun bona humoro kaj juna menso. La Internacian Lingvon ŝi bone regas kaj iam instruis ĝin al gejunuloj. Barbro deziras korespondi kun iu ajn en iu ajn lando por eltrovi pli pri ties vivmanierojn tiumaniere kvietigi sian scivolemon grandan. Kvankam ŝia letero al ni evidentigas bonan stilon kaj scipovon ŝi tamen estas tre modesta sinjorino. Ŝia letero promesas interesan interŝanĝon de ideoj kaj scioj.



Solvo: Krucvortenigmo en la pasinta numero

1	K	2	S	3	P	4	K	5	R	6	O	7	O	V	8	O			
		8	K	9	O	10	V	11	K										
		9	U	10	L	11	O	12	B	13	A	14	K	15	I				
16	F		I					14	R			15	P	16	L	17	E	18	J
				17	O	18	R	19	A										
19	L		U		N		O			20	I	21	M	22	O	23	J		
				23	O		M	24	B		R		A			25	E	26	L
27	K	28	A		J			29	L		A		U			30	S		E
31	L					32	V		R		K				33	C		I	O

## La decida paŝo por la venko de nia lingvo ĵus okazis!

Vi verŝajne ne rimarkis ĝin, ĉar ne temis pri decido de la registaro vaste lertul kaj apliki nian lingvon, sed pri la decido de la Nederlanda registaro disponigi la necesajn financajn rimedojn por ebligi la praktikan elprovaĵon de la DLT-sistemo (vidu revuo "esperanto" 1984, p. 5-7 kaj p. 218-220). Tiu financa subteno nun ebligas la konstruadon de modelaj aparatoj konektataj al personaj komputiloj kaj la evoluadon de la necesaj programoj, por ke oni povu duon-aŭtomate traduki el diversaj lingvoj en interlingvon - kiu estas malambigua Esperanto - kaj per ke oni poste povu tut-aŭtomate traduki el la interlingvo en diversajn etnajn lingvojn. Legu detalojn pri tiu ĝenerala apliko de nia lingvo en la artikolo de R. Eichholz "Esperanto kiel interlingvo en maŝina tradukado", kiu estas originale verkita por la libro "Serta gratulatoria", kiu en la universitato de La Laguna eidosos por honorigi profesoron Juan Régulo Pérez. La artikolo estas represita en "Akademiaj Studoj 1985" kaj krome havebla kiel aparta represo.

En la sama volumo jam troviĝas 74-paĝa kontribuo, en kiu M. Halvelik terminas, kiel oni povus evoluigi la duon-aŭtomatan DLT-sistemon por ke ĝi taŭgu por tut-aŭtomata tekst-analizo. Per tiuj artikoloj vi rimarkos, ke nia lingvo subite fariĝis esenca por la plej avangarda tekniko.

La sube achavalisto montras, ke multaj aliaj leginda kaj pens-instigaj artikoloj troviĝas en la 320-paĝa volumo por 1985. Se vi interesiĝas pri problemoj, pri kiuj oni diskutas en la Akademio, kaj pri la diversaj solvoj, kiujn oni proponis, tiam nepre legu la serion de "Akademiaj Studoj". Ankaŭ vi komuniku al la redaktoro vian opinion pri iuj lingvaj detaloj por la nova rubriko "Leteroj al la redaktoro" kaj verku mem publikiginda kontribuoj. Tiu ĉi serio ne nur celas faciligi la interanĝon de ideoj kaj opinioj inter la membroj de la Akademio, ĝi ankaŭ servas por ebligi al la interese publiko aktive partopreni la opin-interanĝon.



# Akademiaj Studoj

## 1985



ENHAVO (ĉefaj kontribuoj kaj represoj)

Aba Song-san: Koreo, Koreujo		Ĝa Ŝjelli: Plena profitigi produktivecon de	
(el 'la Espero el Korsujo') .. . . . .	122	Esperanta vortaro (el EPC) .. . . . .	45
Albault, D-ro A. (Ak): Maŝina Esperanto .. . . .	7	Halvelik, M.: Tut-aŭtomata tekstanalizo. . . . .	243
Surogata skribo .. . . . .	7	Harry, L.R.: Listo de Stalomonoj en Esperanto. . . . .	144
Unua rolo de la Akademio: bremsilo .. . . . .	8	Kaestl, L.H.: Propraj nomoj, landnomoj kaj aliaj. . . . .	166
Majuskloj en la Fundamento .. . . . .	28	Lapenna, Prof. D-ro L. (Ak):	
Pri landnomoj (el cirk. 145, 146 de la Akad.) .. . . .	111	Pri la pasivaj participoj -ata kaj -ita. . . . .	193
Plena fojon pri Koreo/koreano .. . . . .	131	Malovec, M.: La verbaj aspektoj en Esperanto. . . . .	215
Kion signifas Koreo en Esperanto? .. . . . .	124	Mattos, G. (Ak): La limoj de la neologismo .. . . .	36
Kritiko de la artikolo de s-ro B. Wennergren .. . . .	181	Mi, Lorenac: Interpunkciadiko .. . . . .	19
Bormann, D-ro W. (Ak): Raporto pri la publika		Dua kontribuo al la Esperanta Toponomiko .. . . .	128
kunveno de la Akademio en Vancouvero .. . . .	3	Perko, D-ro K.: Landnomoj fariĝu memstara	
Bujdosó, I.: Perkomputila kontrolo de terminaroj		radikoj .. . . . .	171
(el 'Budapeŝta Informilo') .. . . . .	101	Pilger, W.F.: Hismarkoj pri AkB. 1983 .. . . .	18
Cool, G.: Tesoj pri la participaj sufiksoj .. . . .	205	Substanco por sangi 'X'/'x' al "' resp.' .. . . .	18
Eichholz, R. (Ak): Surogata skribo (respondo) .. . . .	13	Portmann, D.: Projekto G.O.B.K.: Traduki	
Ĉu substantivoj an verboj estas la baza termino? .. . . .	103	kelian lernolibron en Esperanton. . . . .	73
Kiel transkribi 'ŝ' en Ĉinaj nomoj? .. . . . .	104	Recenzo pri 'K-inta Nomenklatur' de Jan Péro. . . . .	81
Ĉu tolerancia en-reguleco		Reizeraĵi, O.: Kritika analizo de la Akademianj propo-	
an as-tolerancia reguleco? .. . . . .	183	ponoj kaj decidoj pri la uzo de verbaj formoj .. . . .	195
Esperanto kiel interlingvo en maŝina tradukado. . . . .	219	Siĝp-Bowitz, Prof. C. (Ak): Esperanta vort-	
García Bizaques, F.:		strukturo kaj Esperanta toponimiko .. . . . .	54
Evoluo de la lingvo Esperanto .. . . . .	31	Zoolojaj kaj geologiaj terminoj en Esperanto .. . . .	87
Golden, B. (Ak): Refuto de la tezo de A. Albault		La vorto 'po' .. . . . .	217
kontraŭla uzo de 'F' antaŭ vokalo .. . . . .	38	Ĉusink-Nagala, A.: Ses aliaj solvoj .. . . . .	182
Kontribuoj al la dialektologio de Esperanto:		Vasilavičius, D-ro A.: Al la bazo sub la	
la estigo de 'buagrasperanto' .. . . . .	40	slogano 'For la hudeon!' .. . . . .	174
La sekso de 'ulo' .. . . . .	49	Wennergren, H.: La Landnomoj -	
Aktoraj kelkaj komentoj pri 'hom.mum' .. . . .	51	Normo sen Reformo .. . . . .	150
Printakso de la landnoma sistemo		Werner, J.: Skaligo kaj normigo de terminaro. . . . .	105
de Bertil Wennergren .. . . . .	162		
Vana ludo pri landnomoj .. . . . .	168		

SEA



ISSN 0006-7024